Universala Esperanto-Asocio

KURIERA KUNSIDO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-33 sendita el Budapeŝto, la 15an de decembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

================

# La Kuriero en Esperanto aprezata

En kunsido en la sidejo de Unesko en Parizo la 12an de decembro, la ĉefredaktoro de la Unesko-Kuriero bonvenigis la ekaperon de Esperanta versio aldone al la ekzistanta familio — la franca, angla, araba, ĉina, hispana, portugala kaj rusa. La kunsido estis konceptita por 10-minuta daŭro, sed la bonvenigo de la esperantistoj estis tiom pozitiva, ke ĝi daŭris 70 minutojn, kun la trakto de tre praktikaj demandoj kaj respondoj. La akceptanta ĉefredaktorino estas s-ino Jasmina Ŝipova, origine el Makedonio, sed en la redaktora posteno jam de 1983. Ŝia nove enpostenigita asistanto estas s-ino Xiaorong Chen el Ĉinio. Ĉe la esperantistoj estis Trezoro Huang Yinbao, sia filino Huang Xiaojuan, François Lo Jacomo, kaj reprezente de UEA, Stefan MacGill.

Refreŝigata per jasmena teo el Ĉinio, ni trairis la 5-punktan tagordon:

**1. Kontrakto:** Klarigite la proceduro por pretigi kaj akceptigi kontrakton inter Unesko kaj la produktanto de la numeroj, la firmao Ora Ponto. Tio suplementas kontrakton la antaŭan tagon subskribitan inter Ora Ponto kaj UEA (vidu foton en la tria paĝo).

**2. Rapidigo:** Akiro de la fontotekstoj pli frue, por rapidigi la grandan traduklaboron kaj per tio limigi la postreston de la aperigo de la E-versio kompare al la aliaj.

**3. Reklamoj:** La rajto aperigi en la kuriero reklamojn aŭ agnoskojn de sponsoroj, ĉefe el Ĉinio, estas konfirmita, laŭ kondiĉoj precizigendaj en la planata kontrakto. Tiu eblo povos firmigi la financan bazon de la E-versio.

**4. Retejo:** Konfirmo pri la eblo konigi en la elŝuta hejmpaĝo de la Kuriero pri la aperigado de versio en Esperanto, eĉ se la numeroj aperas pli malfrue en Eo kompare kun aliaj lingvoj.

**5. Invito de sugestoj, kiel Ora Ponto povos labori pli helpeme**. Venis malmulto da gravaĵoj, ĉefe laŭdoj. Diskutite la bezonoj liveri kvinon da Kurieroj al Unesko, por la arkivo, la biblioteko, la redakcio kaj la Ĝenerala Direktoro, kaj foje por ekspozicioj. Ankaŭ menciite la planoj por la Kuriero en la 103a Universala Kongreso en Lisbono.

Entute tre bonetosa, foje kvarlingva renkontiĝo kun tre pozitivaj rezultoj.

Raportis: SMG.




Trezoro Huang Yinbao prezentas al la ĉefredaktoro s-ino Jasmina Ŝipova la freŝe aperintan trian numeron de la Kuriero en Esperanto. En la suba foto klare videblas la bona etoso de la kunsido.

Ambaŭ fotoj:
Huang Xiaojuan



=====================

Sekvos raportoj pri la multaj ligitaj eventoj okazintaj en Parizo inter la 10a kaj 13a de decembro: la 41a AMO-seminario en la 10a de decembro, la konferenco en Unesko pri la kulmino de la Zamenhof-jaro en la 11a, kaj kunsido de esperantistoj kun la estrino de la pola delegacio al Unesko en la 13a.

Jen momento tuj post la subskribo de la kontrakto inter Ora Ponto kaj UEA, kiun la prezidanto de UEA jam subskribis. Tiu subskribo okazis la antaŭan tagon en la sidejo de Unesko.



Vortoj: 400

Foto: Brian Moon



====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.